


SUDFRANCA STELO



Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier

3a Kvaronjaro 90
N° 114

400 kubanoj la unuan fojon en UK

Unua Kongreso en Karaibo Inaŭguro en ĉeesto de Fidel Castro

Asistió Fidel a la apertura
de evento mundial de esperanto

LA HABANA, 15 de julio (AIN). — El Comandante en Jefe, Fidel Castro, Presidente de los Consejos de Estado y de Ministros, asistió hoy a la apertura del 75 Congreso Mundial de Esperanto, que con la participación de unos mil 500 delegados extranjeros y 400 nacionales sesionará hasta el 21 en el Palacio de las Convenciones.



Le 75e Congrès mondial d'espéranto débute avec 1 500 délégués

• LE 75e CONGRÈS mondial d'espéranto a commencé au Palais des Congrès de La Havane en présence du président Fidel Castro, qui s'est entretenu avec John Wells, président de l'Association universelle d'espéranto, et avec Jesus Castillo, président de l'Association cubaine.

Le vice-président cubain Carlos Rafael Rodriguez a prononcé le discours d'inauguration de la rencontre, à laquelle assistaient plus de 1 500 délégués venus de quelque 50 nations; il a signalé que les organisateurs de cette réunion exceptionnelle savent qu'on les admire pour leur œuvre et qu'on les respecte pour leurs idées.

John Wells et Jesus Castillo ont également pris la parole à cette séance inaugurale.



CUBA capitale de l'Espéranto:

EN PRESENCE DU CHEF DE L'ETAT FIDEL CASTRO,

s'est ouvert à La Havane, en juillet 90 le 75e Congrès Universel d'Espéranto auquel participèrent 1614 délégués de 54 pays, avec pour thème; "Espéranto, Evolution & Diversité Culturelle". Bien évidemment la langue de travail était la Langue Internationale.



"Mi konsideras min soldato de Esperanto!"
Per tiuj ĉi vortoj Fidel Castro, la prezidento de la Kuba respubliko, adiaŭis de John Wells, prezidanto de UEA, kun kiu longe interparolis dum la luksa akcepto, kiun li ofertis al granda reprezentantaro de la 75-a Universala Kongreso...

Li incitis la ĉeestantojn ne timi, se ili sentas sin tro malmultaj. "Ankaŭ kristanismo en la komenco komencis el eĉ pli malgranda grupo. Sed ili venkis; ja, oni krucumis la kristancjn, oni ĵetis ilin al la leonoj. Sed ili venkis. Vi ankaŭ venkos. Mi ne volas, ke oni krucumu vin, ke oni ĵetu vin al la leonoj, sed vi venkos, ĉar via ideo estas prava".

(La Havana Kuriero)

Pierre
JANTON
à
Nîmes
le 8/12

voir rubrique
Nîmes p.4/r

Certe la lasta UK estis mejloŝtono en la historio de la movado, pro la ĉeesto de la ŝtatestro k. de la Vic-prezidento.

Kiel kutime la kongresanoj venis el tre diversaj landoj : 15 el Aŭstralio, 61 el Finnlando, 91 el Francio, 99 el Germanio, 4 el Irano, 127 el Japanio, 9 el Koreio, 66 el Pollando, 48 el Svedio, 2 el Turkio, 35 el Usono, ktp, ktp.

Ĉu, kiel Fidel Castro, vi povas diri: "Mi konsideras min soldato de E" ?

Kelkaj esperantistoj el diversaj francaj E°-asocioj manifestaciis la 13an de Oktobro en Parizo.

Ili memorigis, ke Esperanto ekzistas kaj ke ĝi ebligas rektan komunikadon.

Se vi ne povas esti batalanto por E°, estu almenaŭ atestanto pri ĝiaj eblecoj!

La Federacia Kongreso de 91 okazos en ARLES la 13an kaj 14an de Aprilo;

Ni kongresos kune kun la Provenca federacio. Jam notu la datojn!

Vian helpon ni petas...

Jes, ja...ni bezonas viajn informojn, vian kontribuon, vian vidpunkton. Prenu blankan folion, skribilon, respondu al kelkaj demandoj (indiku la numeron) kaj resendu al SFS (ĉe J.Hénin 48500 La Canourgue) aŭ al la federacia sekretario (C.Gérard, 4R.Dr Rives 66000 Perpignan). Anticipan dankon!

- 1°) ĉu vi partoprenis en E° kurso en 90? Antaŭ Junio, nun?
- 2°) ĉu vi instruis E-on en 90? al plenkreskuloj? al geinfanoj? kiom? Antaŭ Junio? Nun?
- 3°) ĉu vi prezentis E-on al neesperantistoj? per ekspozicio? per lumbildoj? en forumo?
- 4°) ĉu vi intencas tion fari? baldaŭ? en 91?
- 5°) ĉu vi estus preta tion fari kun la helpo de la federacio?
- 6°) Kiun materialon vi bezonas aŭ bezonus? ĉu vi bezonas financon helpon?
- 7°) ĉu vi havas specialan projekton?
- 8°) ĉu vi intencas ĉeesti kongreson en 91? federacian? nacian? internacian?
- 9°) ĉu vi partoprenis staĝon en 90? partoprenos en 91?
- 10°) ĉu 4-taga staĝo je ĉielirado (9-12 V) interesus vin? kiel lernanto? kiel instruisto?
- 11°) kion alian vi ŝatus legi en SFS? ĉu vi pretas verki ion?
- 12°) ĉu vi povas indiki la adreson de persono, al kiu ni povus ^{sendi} senpagan ekzempleron de SFS?
- 13°) " " " " de asocio, biblioteko, al kiu ni povus ^{sendi} senpage "E°- actualités " (en la franca)?
- 14°) La federacio pretas donaci al kolegioj bildstrion pri Zamenhof kaj al liceoj la libre-ton de P. Janton (Puf). Ĉu vi povas rekomendi adresojn? Ĉu vi-mem pretus transdoni al la lernejestro aŭ al la bibliotekisto?
- 15°) kion novan vi proponas por konigi E-on? por la vivo de la grupoj? de la federacio?

Ĉi se vi respondos nur unu demandon, ni estos tre dankemaj. Esperanto estas ĉies afero.

Venontaj UK

- 91: Bergen (Norvegio)
 92: Prago (Ĉeĥoslovakio) - kun rezervo
 93: Valencio (Hispanio) kandidatigis
 94: Koreio/Japanio " "
 95: Tampere (Finnlando) " "

 premiitajn en Palamb's (Floraj Ludoj) kaj, se estas tro malfrue por inviti vin al la 20a datreveno de la ĝemeliĝo Arles-Vercelli en Arles la 20an kaj 21an de Oktobro, eble interesos vin ekscii, ke perfektiga staĝo estas organizata en Le Pontet apud Avignon la 17an kaj 18an de Novembro (ĉambro+manĝoj: 300F). Kontakti J. Couderc 3 Rue des Grottes/Avignon.

Regustigo

Ni anoncas sur la p.8, ke ni ne ricevis informojn de niaj najbaroj (Provence-E° k. Kataluna Esperantisto). Fakte ambaŭ kultenoj atingis nin lastmomente antaŭ enpoŝtigo de la prov-folioj (la 25an de Oktobro...pro nerespekto de la limdato!). En la venonta n° vi povos legi poemojn

L'ESPERANTO existe encore !

La langue internationale poursuit même son développement : lentement mais sûrement, sans le soutien d'une quelconque grande puissance.

Les espérantistes défendent, depuis plus d'un siècle, les conditions concrètes d'exercice d'un droit de l'homme négligé: le droit à la communication

quelle que soit la langue maternelle de chacun : de grande diffusion ou "minoritaire", du Nord enrichi ou du Sud encore pauvre.

La communication internationale directe, "écologique", sans écouteurs ni interprète.

Ils refusent que l'immense majorité de la planète tente de maîtriser une langue dominante pendant que la minorité s'enrichit grâce aux études et recherches qu'elle peut mener dans sa propre langue maternelle.

Pour se faire entendre quelques associations espérantistes d'Europe saisissent l'occasion de l'actuelle accélération de l'union européenne pour mettre en lumière ce problème.

Elles organisent pour la deuxième fois cette année devant le siège d'un organisme de radio-TV une manifestation.

La kutima federacia laborkunveno okazis en la familia centro de Lazaret en Sète, la 23an de Septembro, kun la partopreno de multaj esperantistoj kaj finis la Internacian Semajnon, tre bone organizitan de F-ino Vierne.

Je la deka la prezidanto malfermis la kunsidon kaj dankis la ĉeestantojn. Li senkulpigis S-inon Authier, kiu ne povis ĉeesti pro baldaŭa operacio de la okuloj.

La Internaciaj Semajnoj de Habère-Poche kaj Sète disvolviĝis en internacia etoso; partoprenis esperantistoj el Germanio, Italio, Pollando, Nederlando..., la kursoj estis tre interesaj. Venontjare la Internaciaj Semajnoj okazos la lastan semajnon de Aŭgusto en Habère-Poche kaj la duan semajnon de Septembro en Sète.

Parolis S-ino Gaussen pri la infana staĝo en Beauville apud Agen. Ŝiaj gelernantoj estis tre kontentaj; parto de la prezo de la staĝo estis pagita de la Federacio, dank'al la subvencio de la regiona konsilantaro. Jorgos parolis pri ekologia staĝo sur Larzako. Pluraj grupoj jam partoprenis la forumojn de la asocioj (Montpellier, baldaŭ Béziers kaj Perpignan)*Narbonne ne povas partopreni tiun-ĉi jaron pro la malsano de la edzo de S-ino Jaloux. Ni memorigas al ĉiuj, ke paneloj estas disponeblaj por forumoj aŭ ekspozicioj (rilati kun S-ro Cayzac aŭ S-ro Capus en Montpellier).

Eble la Nacia Kongreso okazos en Nîmes en 92 sed Pentekosto ne taŭgas pro la festoj de la "feria". Ebla dato estus la semajnfino de la 1a de Majo. Ges. Tournon prizorgos la aferon** La prezidanto legas leteron de S-ro Bénazet, kie li anoncas sian rezignon pri la kurso en la kolegio de Lezignan-Corbières. Dankojn pro la klopodo, ni bedaŭras la maldaŭrigon. S-ro Llech-Walter mencias la kursojn en Perpignan, montrofenestron ĉe la sidejo de la kultura klubo, informojn pri esperanto ĉe Radio Arrels dank'al S-ino Llapart Carmen. Li gratulas F-inon Manguine, S-ron Bénazet kaj S-ron Gérard pro la trijaraj kursoj sur la ondoj de Fréquence-Sud. Dum unu jaro oni ne elsendos esperanto-kurson.*** Ankaŭ ekzistas en Nîmes radio-stacio, kiu elsendas en E°.

La korespondaj kursoj de C. Cayzac funkcias bone, laŭ raporto de F-ino Vierne. Jean Hénin en Lozère akceptis vizitantojn dank'al la "Pasporta Servo". Li pledas, por ke pluraj personoj tra la federacio konsentu fariĝi gastigantoj por gejunuloj; estus bone, se ĉiu departemento disponus pri almenaŭ unu adreso. Li ankaŭ intencas organizi karavanon por aŭtomobilistoj al la UK de Bergen (Norvegio).

S-ino Gaussen kaj eble S-ro Hénin planas partopreni kun gelernantoj en la Paska staĝo de Grésillon, la Federacio helpos.

Nenio nova pri la elsendo "C'est pas juste". Profesoro Pierre Janton prelegos en Nîmes por franca publiko en la Domo de Eŭropo, je la 18a horo la 8an de Decembro.

La venonta federacia kongreso okazos kun tiu de la federacio de Provenco -Lazurbordo**** en Arles la 13an kaj 14an de Aprilo 1991, antaŭ la Paskaj ferioj. Kiu grupo bonvolos prizorgi la sekvontan federacian kongreson? Respondo atendata...

Koncerto de la Nederlanda grupo "Kajto". Ĝi okazos la unuan semajnon de Aprilo. La federacio povus inviti ilin, eble en Montpellier. Estus pli bone, se ne-esperantista grupo (dancista aŭ kantista) prizorgus la koncerton.

Staĝo de Batipaume (aŭ aliloke je Cielirado): mankas geinstruistoj. S-ro Boumal sin proponas. La sekretario de la Federacio rilatos kun la grupo de Béziers.

Anonco aperos en la senpagaj gazetoj de la diversaj departementoj (pri E°)

Caŭduro: "Mondhejmo" petis subvencion por la konstruado de la tegmento. Post diskutado, oni decidis (21 por, 1 kontraŭ, 2 sindetenoj) pli bone informiĝi pri diversaj punktoj (posedorajtoj, ktp) antaŭ ol doni la petitan sumon.

La kunsido finiĝis je la 16a.

Protokolis la sekretario Charles GERARD-VOIÇON

* datoj de la forumoj de la asocioj: Béziers, la 12an kaj 13an de Oktobro, Perpignan, la 1an kaj 2an de Decembro.

**Ŝajnas nun, ke la grupo de Nîmes rezignas pri la organizado de la Nacia kongreso

*** Finfine Fréquence-Sud realsendos la malnovajn kursojn.

****Delegacio de nia federacio renkontos reprezentantojn de la Provenca federacio en Arles je la 10a de Novembro. Ĝi konsistos el S-ino Négron, S-roj Gérard, Hénin, Llech-Walter kaj Tournon.

Vizito de eksterlandano: S-ro Polaks el Latvio (Letonio) vizitos Francion inter la 20a de Novembro kaj la 17a de Decembro kaj prelegos pri sportoj.

Aranĝas la vojplanon S-ino O. Scheidel, 35 Grand'Rue 67660 Betschdorf Tel: 88 54 45 02

BEZIERS

Kiel ĉiujare, ni organizos amikan feston okaze de la Zamenhofa tago. Ĝi disvolviĝos la 16an de Decembro. Pro novaj aranĝoj por la "Domo de Asocioj" fare de la urba konsilantaro, ni ne povas nun konigi la precizan lokon. Tiuj, kiuj enskribiĝos, ricevos la informon en taŭga tempo. La programo estos:

- je la 11a¹/₂ : la grupo ofertas aperitivon
 - je la 12a¹/₂ : komuna manĝo, preparita de la Béziers-aj grupanoj, prezo 50 F.
 - je la 14a h: post la aŭdado de la voĉo de Zamenhof, distra parto.
- La kunveno finiĝos sufiĉe frue (je la 4a proksimume), por ke ĉiuj povu rehejmeniri antaŭ la nokto.

Konigu vian partoprenon antaŭ la 10a de Decembro (pro la aĉeto de provianto) aŭ perletere al C.B.E. 9, Rue G. Picot 34500 Béziers aŭ telefone al 67-31-13-18 aŭ 67-31-13-46 aŭ 67-38-03-52.

Rememorigo : venontaj monataj kunvenoj la 10an de Novembro k. 2an de Decembro (vidu la antaŭan SFS).

La 12an kaj 13an de Oktobro, nia grupo havis budon ĉe la forumo de la Asocioj. Malgraŭ la vetero, kontentiga vizitataro. S-roj Peray kaj Doury deĵoris la du tagojn. S-ro A. Sanz prizorgos kurson por komencantoj.

Ni deziras al S. Authier bonan resaniĝon post sia operacio de la okuloj.

MONTPELLIER

Vi legos aliloke en tiu bulteno raportojn pri la ISE (Internaciaj Semajnoj de Esperanto). Gratulojn al la grupo de Montpellier kaj speciale al Y. Vierne, kiu tiel dediĉe organizas tiujn aranĝojn.

Monataj kunvenoj: Kiel kutime, la Montpelliera esperanto-grupo kunvenos ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 18a horo en "Centre social des allocations familiales", kiu situas 410, Avenue de Barcelone en Montpellier-La Paillade. Jen la antaŭvidita programo por la lasta trimestro de la jaro:

- 3 X : agad- kaj financ-raporto; projektoj ;
- 7 XI: Louis ENSUQUE parolos pri Egiptio;
- 5 XII: S-ino LAURENTI parolos pri Kubo.

La grupo sendis leteron al 22 adresoj por proponi la viziton de la Nederlanda grupo "Kajto". Espereble venos almenaŭ unu pozitiva respondo.

En Julio geedziĝis Claude Cayzac kaj Anna. Al ambaŭ ni deziras feliĉajn jarojn. Esperanto = edz/peranto !

NIMES

Aperis "La Krokodilo". Abundas tiuj bestoj en Esperantio sed en Nîmes, temas pri interna bulteneto de la grupo. En la unua numero aperis listo de la membroj kaj simpatiantoj, anonco pri la esperantaj elsendoj de RADIO TIP, ĉiun unuan sabaton de la monato de la 10a h. ĝis la 10a¹/₂ sur 105,8 Mhz, listo de la kursoj kaj informoj pri la prelego de Profesoro P. Janton en Decembro kaj diversaj renkontoj. Se interesus vin vojaĝo perbusa al Bergen, Torino (Itala kongreso en Septembro 91), ktp informu la grupon, kies sidejo troviĝas nun ĉe la prezidanto P. Touron, 3, Rue de Combret. Jam estas anoncita pikniko kun la grupoj de Avignon kaj de Vaucluse en Meynes kaj Comps la 11an kaj 12an de Majo 1991. Ci-sube ekstrakto de la "Krokodilo":

***** K U R S O J *****

KLUBO de ST MAMERT Rue de la Galiniere 30730 ST MAMERT

KLUBO JULES VERNES CES J Vernes 30000 NIMES

ECOLE de L'EUROPE 1, Pl du chateau 30000 NIMES

Ciulunde 16.30/17.30 Unua grado + 17.30/19.00 Dua grado

PADLO NERUDA ĉiumerkrede ekde 15.30 konversaciaj ekzercoj

Pri tiuj diversaj kursoj informiĝu ĉe Sino GAUSSEN.

Ni multe bedaŭras ne povi daŭrigi la kursojn de nia amikino G. SOULIER en la grupo CADREF, sed tiu afero bezonis grupon da almenaŭ 15 partoprenantoj kaj nia instruitino laciĝis post du jaroj da laboro. Ni ne forgesu danki ŝin pro ŝia efika laboro!

Atentu!

GRAVA INFORMO

Konferenco de PROFESORO JANTON de Fakultato de Clermont-Ferrand
Maison de l'Europe 1a etaĝo SABATOn 8 Decembron 1990 je la 18a.

P-ro P.Janton prelegos en la franca pri "Kiu komuna lingvo por Eŭropo?". Tiu prelego estas kompreneble por ĝenerala publiko sed ni ankaŭ esperas, ke multaj esperantistoj ĉeestos. Post la prelego, vi povos komune vespermanĝi (100F). Informi S-inon A. Gausсен Rue de la Galinière

30730 St Mamert Tel:66 81 14 94. Gis!

S-ino Gausсен partoprenis kun 8 gejunuloj en renkonto apud Agen. Jen la letero ricevita tuj poste kaj raporto (en reduktita formato) aperinta en "Laŭte".

"8 infanoj de la klubo de St Mamert restadis en la muelejo de Beauville. La infanoj naŭ/dekdu-jaraj dankas la Federacion pro ĝia financa helpo. Estis bela vetero, bonega manĝo, multe da spektakloj, ĉar dum la semajno okazis la internacia salono por infanoj, multe da vizitoj faritaj (grotoj, praarbaro...). La infanoj multe progresis. Ili registris kasedon en la fino de la semajno, tiel la gepatroj povas vidi la progresojn. Ili renkontis polajn, germanajn infanojn. Bonega etoso! Dankon al Solange, Katerine, Kristian, Gaston kaj ĉiuj, kiuj zorgis pri ni. Gis revido!

La infana klubo de St Mamert."

INFANOJ INVADAS NIAN MUELEJON...

Dum la lasta semajno de julio, la muelejo de Beauville spertis novan Junecon pro la ĉeesto de ok gajaj infanoj, energiplenaj malgraŭ prema varmego.


Ses venis el la regiono de Nimes, akompanataj de Andrea GAUSSEN, kiu instruis al ili esperanton dum la lerna jaro. Milan, sep-jara nederlandano tuj iĝis parto de la grupo, same kiel Sabrina ("kvarjara kaj duono"), kiu plej nature babilas, ludas, petolas en esperanto, ŝia patra lingvo.

Kion faris tiuj infanoj dum sia restado en la muelejo? Oni vidis ilin tre serioze fiŝkapti en la sekiĝinta rivero por savi la mortantajn fiŝojn, kuiri, purigi la muelejon (ĉefe la banĉambron per multe da akvo), zorgi pri la kokinoj, anasoj kaj aliaj bestoj, ludi, registri siajn rakontojn kaj skeĉojn sur kasedo, kanti, ekskursi, organizi vesperan spektaklon... kaj eĉ lerni esperanton dum du horoj tage. Sed pli bone estas lasi ilin mem rakonti, ankaŭ pri siaj problemetoj (vundo kaj malsano):

"Komence de la posttagmezo Aline fiŝkaptis proksimume kvardek fiŝojn: dek grandajn kaj tridek malgrandajn." SEBASTIEN

"Aline kaj mi renkontis Gastonon. Li estas maljunulo. Li aranĝis la riveron.

Dimanĉon, ni renkontis la skoltojn. Ili estas dek personoj tre afablaj. Ili fariĝis miaj geamikoj. Ni ludis per akvo kaj fine ni estis tute malsekaj. London, mi estis malsana kaj mi kuŝis..." NADEGE



"Mi faris du kukojn kun citrono kaj ĉokolado. Ili estis bon-gustaj."

VANESSA G.

"Mi volis salti super barilo el lado. La dekstra kruro tuŝis la ladon. La sango fluis. Estis profunda fendo. Sinjorino Gausсен transportis min al la kuracisto de la vilaĝo."

VANESSA M.

"Ni iris al la groto. Ni vidis stalaktitojn kaj stalagmitojn. Ni malsupreniris du ŝtuparojn."

GERALD

"Mi lernis paroli esperanton kun Katerina. Mi ludis kun Ĝeraldo."

MILAN.

"Dimanĉon ni iris al Puymirol, 25 kilometrojn de Beauville, ĉar tie estis festo. Ni rigardis teatraĵon: "La malgranda fingrulo."

ALINE.

Kio restos post la reveno hejmen?

* Tiuj infanoj aŭdis esperanton uzatan en ĉiutaga vivo. Ili uzis ĝin en realaj situacioj (por peti, danki, proponi, fari recepton...) kaj spertis, ke ĝi povas funkcii. Plej frapis ilin la infanaj babiladoj de Sabrina.

* Ili konsciis, ke ili kapablas rakonti, teatri, ludi en esperanto kaj konservis kasedon kaj kasetojn kiel spurojn de siaj travivaĵoj kaj de siaj atingoj.

* La deziro rilati kun la nederlanda amiketo Milan, kiu ne komprenis la francan, estis eble la plej forta instigo ambauflanke por plu lerni.

Ĝis venonta jaro!



LA CANOURGUE: Pluraj gejunuloj haltis en La Canourgue dank'al "Pasporta Servo", inter ili du Gebritoj, kiuj ankaŭ vizitis S-inon Gausсен.

Jean Hénin planas karavanan por aŭtomobilistoj al la kongreso de Bergen (Norvegio). Se vi deziras pliajn informojn pri tiu karavano, kontaktu lin.

Marcelle Maurin partoprenis la UK de Kubo. Dankon al ŝi pro la dokumentoj, kiuj ebligis raporton en "Sudfrancia Stelo" pri tiu grava evento.

Mia amiko André Rocher perdis sian patrinon en Aŭgusto. Nian plej sinceran kondolencon.

ISE

= Internaciaj semajnoj de Esperanto en Habère-Poche kaj Agde.

Entute partoprenis 123 personoj (je la komenco en 1979...30 !)
 Ili venis el tri kontinentoj (Oceanio, Ameriko, Eŭropo) kaj
 el dek landoj (15 eksterlandanoj).
 Estis 43 kandidatoj al la 4 ekzamenoj de FEI.
 La libroservoj, malgraŭ la prokrasto de la alveno de la menditaĵoj, vendis
 librojn por 10 000F (senprofite!). La kontoj de ĉiu semajno superas...
 ...100 000F. Ise ne estas bagatelo.
 Se vi intencas partopreni en 91, sciue, ke la feriejoj estas jam menditaj.
 Denove oni povos elekti inter la montaro kaj la marbordo, tre precize
en Habère-Poche la lastan semajnon de Aŭgusto (de la 24a ĝis la 31a)
en Sète la duan semajnon de Septembro (de la 7a ĝis la 14a). Ĝis!

Pri la staĝo en Habère-Poche :

Somera Internacia Semajna Staĝo okazis de la 23a ĝis la 30a de Aŭgusto 1990 en Habère-Poche, en la Domo "Joie de Vivre" ĉe Alpoj.
 60 geĉeestantoj sekvis kursojn. Kiel kutime estis 3 kursoj, respektive gvidataj de
 -Sro Moirand (3a grada)
 -Sro Baudé (2a grada)
 -S-ino Catherine Samain (1a grada).

El la 60 partoprenantoj estis 5 geknaboj, kiuj bone spertis la lingvon. Antaŭ la fino de la staĝo ili ludis scenetojn.
 Dum la staĝo okazis por la publiko "Tago de malfermitaj pordoj".
 La magistratanoj de la vilaĝo kaj de apudaj urboj de la "Verda Valo" estis invititaj. Bedaŭrinde kelkaj el ili ne povis partopreni, ĉar urĝajn aferojn en Parizo ili devis ĉeesti. Bela ekspozicio pri Esperanto konatigis al la kelkaj vizitantoj la historion de la lingvo kaj la movadon.
 Artikoloj aperis en gazetoj kaj oni gluis afiŝetojn en butikoj.
 La "Verda Valo" iom bruis pri Esperanto.
 Honora vino organizita de la estro de la Domo "Joie de Vivre" konkludis la kunvenon. Novajn nekonatajn vizaĝojn ni renkontis ĉe la partoprenantoj. Bona aŭguro por la movado.
 La fakto, ke ĉi-jare okazis sinsekve du staĝoj (la unua en Habère-Poche, la dua en Sète du semajnojn poste) estas verŝajne la kaŭzo de tiu sukceso, kaj tion ni ŝuldas al S-ino Vierne, kiu ne timis organizi du staĝojn samjare.
 Belajn kaj interesajn lumbildojn prezentis S-ino Humm dum la distraj vesperoj.
 Pluraj gelernantoj trapasis ekzamenojn el diversaj gradoj.


Raportis Annick Tora.

Ni ne ricevis raporton pri la semajno de Sète, sed pro tio ke ĝi okazis la 15an fojon, oni povas fidi la organizintojn pri glata disvolviĝo. Inter la 60 partoprenintoj estis esperantistoj el Germanio, Hispanio, Pollando, Italio, Novzelando. La Novzelandano (S-ro Stephan Mac Gill, kiu loĝas nun en Budapeŝto) gvidis unu el la kursoj.

VIDEOBENDO "L'ESPERANTO, ça marche": la nova evento de la jaro estas la provo fare de UFE realigi videobendon uzeblan de ĉiuj vi fronte al ĉiaj publikoj. Vi povos tiel organizi esperanto-prezenton, eĉ se vi estas sola en via urbeto, en via kultura centro. Ne plu necesas esti elstara preleganto, sufiĉas esti preta kompletigi la informadon de la videobendo per la vera propra sperto.

La uzita materialo fontas el la diversaj ekspoziciiloj de niaj federacioj selektitaj, ordigitaj, .. kaj akompanitaj de paroloj kaj iom da muziko. La filmo daŭras ĉ. 30 min. Vi kompreneble povas malŝalti la sonon ĉe la TV kaj mem prezenti parole tute aŭ parte. Vi povas haltigi la videoprezenton ĉiufoje kiam aperas la UFE logobildon por respondi demandojn pri la ĝistiamaj bildoj. Dum tiuj paŭzoj estas muzikaĵoj el verdaj kanzonistoj, kiujn vi aŭskultigas aŭ ne. La prezo estas 180F (200F kun ekspedokostoj). *La federacio posedas nun tiun kasedon, kiun vi povas pruntepreni por ekspozicio, ludo en forumo de asocioj, ktp*

LA LIGILO DE U.F.E. Ne nur sur la videobendo, sed ankaŭ pli kaj pli sur la diversaj dokumentoj, vi vidos nian novan logilon, kiu montras kaj la verdan stelon kaj la simbolon de la jubileo (du inversaj E simbolas la globuson).



ESPERANTO-FRANCE

HISTORIA SKIZO PRI LA ESPERANTA MOVADO EN DEPARTEMENTO GARD
DUA PERIODO : INTER LA DU MONDMILITOJ

En Nîmo, en la 30-aj jaroj funkciis aktive laborista grupo sub impulso de D-ro Georges Salan, kuracisto, komunisto. Li prenis gravan parton en la skismo de la laborista esperanta movado : fondo de IPE (internacio de proletaĵ esperantistoj konkurenca al SAI) kaj en Francio de FEP (fédération des espérantistes prolétariens) konkurenca al FEO (fédération esperantiste ouvrière) Li tre aktivis. Post fiasko de IPE kaj de FEP, li seniluziigite kabeis dum trideko da jaroj. Ni tamen retrovos lin en la tria periodo.

TRIA PERIODO : POST LA DUA MONDMILITO

EN ALESO. Esperanto renaskiĝis en Aleso en 1948 dank'al klopodoj de S-ino Lanoux. Ges-roj Lanoux, komercistoj sur strato Taisson en Aleso, estis delonge esperantistoj. Antaŭ la milito ili loĝis en Hyères (Var), kaj tie gvidis la lokan grupon. En somero 1948 Ges-roj Lanoux partoprenis en la unua postmilita UK en Nederlando. Tie ili renkontis ges-rojn Volpelière el Nîmo kaj konatiĝis kun ili. De ili ili eksciis, ke instruisto en Aleso, S-ro René Raynaud, trapasis la atestojn en Nîmo, kaj ke S-ino Beguignot, el la grupo de Nîmo, baldaŭ translokiĝos en Aleson. En oktobro S-ino Lanoux kontaktis ilin kaj proponis krei esperantistan grupon. Ŝi fariĝis la prezidantino, S-ino Béguignot la kasiŝtino, kaj S-ro Reynaud la sekretario.

Buŝa propagando, serio da artikoletoj en la lokaj eldonoj de la regionaj gazetoj por klarigi, kio estas esperanto. Kun permeso de la koncernata aŭtoritato S-ro Raynaud malfermis kurson por plenkreskuloj en iu klasĉambro de la lernejo Mistral. La kurso okazis post vespermanĝo ĉiumerkrede. La inaŭguro estis "triumfa".

Ĉiuj el la 40 sidlokoj de la klasĉambro estis okupitaj, kaj kelkaj personoj staris. Ĉirkaŭ 15 gejunular-gastejanoj partoprenis. Inter ili du junaj fratinoj, fraŭlinoj Vierne : Yvette, nun doktorino en Montpellier, kaj Lucette (S-ino Négron) instruistino en Lunelo, ĉiam aktivis en la Federacio Langvedoko-Rusiljono

Plie instruisto Raynaud kvazaŭ ĝemeligis sian propran klason kun klaso de samaĝaj nederlandaj lernantoj. Ili intersanĝis klasajn gazetojn kompostitajn per Freinet-materialo.

En 1951 ni organizis la Federacian kongreson kun R. Llech-Walter prezidanto de la Federacio. Honora prezidanto estis S-ro Ernest Lauze, kiu, jam tre maljuna, retiriĝis en Anduze. Li tamen ne estis la plej maljuna kongresano : tiu estis S-ro Escarré el Armissan (Aude), kaj la plej junaj estis la du adoptitaj filinoj de Ges-roj Lanoux, Malou kaj Mathé.

Kelkajn jarojn poste S-ro Llech-Walter kaj Gendre el Perpinjano prelegis en la urba teatro. Poste ni akceptis S-ron Lapenna, prezidanton de UEA, sub la aŭspicioj de la scienca Societo, sed anoncante Prelegon pri Jugoslavio sen mencio pri esperanto. Cent kvindek personoj, inter kiuj la urbestro eks-ministro Béchard, plenigis la salonon de la komerca ĉambro. S-ro Lapenna parolis en esperanto, kaj s-ro Raynaud tradukis frazon post frazo por la ĉeestantaj franclingvanoj.

Denove kongreso en 1958. Bedaŭrinde tro frue malaperis S-ino Lanoux.

Post la malfermo de nova minlernejo en la antaŭurbo "Chantilly", la forlasita fariĝis Komunuma Kultura Centro, kie oni disponigis al ni ĉambron (nia sidejo). Tie de nun okazis kunvenoj, sed bedaŭrinde la nombro de la gekursanoj ne superis dek aŭ dekdu. La plej fidelaj venis de la Grand-Combe.

Je tiu epoko S-ro Pelletier, emerita fervojisto kaj lerta esperantisto, venis loĝi en Cendras, je 12 km de Aleso kaj regule partoprenis en la vivo de la grupo.

Ĉe niaj najbaroj

AVIGNON : Kiel en Béziers, oni festos la Zamenhofan tagon la 16an de Decembro.

Kunvenejo : Centro SOUVINE ekde la 9a h.

S. Humm prelegos je la 10a pri "la danĝera lingvo" kaj montros lumbildojn je la 14a pri la temo "la virino en la verkaro de Rodin". Komuna tagmanĝo

SUD-KATALUNIO : Neniu informoj atingis nin. Same pri PROVENCO.

ARIEGE : Tie aktivas nia amiko kaj eksfederaciisto Jorgos, kiu dum la somero instruis E-on sur Larzako kaj helpis dum la semajno de Sète.

La lan de Junio okazis ekspozicio kaj prelego pri E° en Lérans-Pays d'Olmes. La ĉi-suba raporto aperis en "la Dépêche" Ni anstataŭigis la foton de la gazeto per alia.

EUROPE ET LANGAGE

L'espérance en

« terre courage »

Dans une Europe qui parle pas moins de neuf langues officielles et dépense des fortunes en travaux de traduction, l'espéranto est-il la solution ? L'objet d'une conférence-débat à Lérans.

Georges Comte, alias Jorgos, alors demeurant à Céret (PO), se lance, en février 1987, avec une poignée d'amis, dans un périple à bicyclette qui durera dix mois à travers vingt-trois pays d'Europe afin d'y prendre la mesure des barrières linguistiques et d'y évaluer la situation d'un mouvement encore peu répandu en France, celui des espérantistes.

Après 20.000 km, 250 interviews (donc 13 TV) et de nombreux contacts avec les maires des villes-étapes, ainsi qu'à l'UNESCO, l'ONU (Genève), la Commission des communautés européennes et le Conseil de l'Europe, il ne fallait pas en rester là. Et ils remirent cela en 1988, pour 10.000 km, avec un groupe plus international, participant au congrès de la Fédération des cyclos européens, à Barcelone (Catalogne), et au congrès international des jeunes espérantistes, à Zagreb (Yougoslavie), sur le thème de la communication.

Au printemps 1989, notre homme vint s'installer en Ariège et prépara le passage en France du III^e Tour d'Europe à vélo pour l'espéranto.

La municipalité et le Syndicat d'initiative de Lérans s'intéressent aux idées neuves et généreuses (parrainage d'un village roumain par exemple) et l'espéranto, langue de communication transnationale non discriminatoire, cette jeune centenaire, ne peut que faire

poser la question : qu'est-ce que c'est ?

Une conférence-débat fut donc organisée pour animer une exposition sur la littérature (traduite et originale), la presse (locale et spécialisée), les méthodes d'enseignement (par cassettes ou correspondance, stages, etc.), les dépliants touristiques et les radios diffusant régulièrement en langue internationale espéranto.

Vers 20 h 30, après que l'exposition eut été visitée par les élèves d'écoles voisines, la petite salle des Tilleuls commença à se remplir de Léransais (mairie en tête), d'espérantophones, d'Ariégeois et d'Audois désireux de s'informer.

Nous eûmes droit à un plaidoyer magistral en faveur de cette langue conventionnelle, si nécessaire dans notre monde de « communicants » (30% du budget de la CEE est englouti par les services de traduction avec neuf langues officielles pour seulement douze pays), présenté par M. Michel Lafosse.

Ce fut ensuite au tour de M. Jacques Caubel, ingénieur au CNES, de nous parler de l'histoire du mouvement espérantiste et de la structure de la langue.

M. Comte intervint lors du débat qui suivit pour donner des précisions sur les « mesures » du mouvement et de l'enseignement de l'espéranto. Les universités enseignant l'espéranto se multiplient (aucune en 1950, plus de 150



Alvoko

De la 8a ĝis la 11a de Novembro stariĝos E°-ekspozicio en la urbodomo de Laroque d'Olmes "por vigligi lokan E°-kurson kaj instigi fondon de E°-grupo sur nova grundo" .../... "kiel subteno, ni petas vin, bonvolu sendi poŝtkarton de via urbo (kun filatela poŝtmarko)" ...

Antaŭdankas HELPO ĉe JORGOS

09120 St Félix de Rieutort.

Post la staĝo sur Larzako, Jorgos sendis al SFS la jenan leteron por pripensado.

Marseille ... Paris ... Ste-FOY-la-Cde ... St-BONNET-de-CRAY ... MILLAU ...

Ariège, '90-IX

Post-staĝa pripensado...

Kiel eblas en renkontiĝo de du francaj lumete verdaj movadetoj (la Verd-Partia kaj la E°-favorantara), ke tiom malmulte eblas ? ? ?

Ĉiuj (aŭ kiuj ne ?) Esp-istoj ekĝojis, kiam franca Verd-Partio voĉdonis favore al E° en "Marseille"-marsej-(Marsejlo)... sed kion povas Esp-istoj por tia partio kaj kiacele ? ...ni praktike respondu ! (sur Larzak-plataĵo ne multis E°-instruemoj).

Ce Verd-Partianoj, kelkaj malfavoras E-on (vi ja ne miru !) per konata misargumentado (kiu trafe rebatos ?), sed ĉu la favore voĉdonintoj pli volis nemalfavori, ĉu pli ja-favori ? Kial nur 3 aŭ 4 parti-anoj partoprenis la staĝon (...500 favore al E° voĉdonis en "Marseille") ?

Helpon bezonas la partio (LES VERTS - LA VERD-PARTIANOJ

19, Rue Titon

75 011 PARIS) per :

-subteno, informpetoj, informoj de eksterlandanoj (eĉ nesampartianoj);

-tradukado de ĉiaj dokumentoj tra AVUE kaj EKES;

-lokaj instigoj al respondeco post "Marseille"-voĉdonado, ĝis kiam

ĉiu loka Verdpartia grupo decidigu esp-igi unu el siaj membroj ...tio sumu 100 ĝis 500 pliaj E-aktivuloj ! Ni Esp-istoj (ĉiukoloraj ...ni ne ĵaluzu pri la vojo !) tion atingu en du jaroj, ĉu ne? ...poste ni trafu alia(j)n partio(j)n.

aujourd'hui, dont 5 en France). Assimil vend plus de méthodes pour l'étude de l'espéranto que pour toutes les langues régionales de France réunies.

Une soirée bien intéressante, que l'on aurait volontiers prolongée et qui peut être réitérée en Ariège-Pyrénées, la « terre courage ».

« Gis revido » (djiss ré-vido) : au revoir !

Des cours ont démarré. Contacter G. Comte (tél. 61.60.86.83); Espéranto Pyrénées, 09120 Verniole, ou Eurokka, 31450 Donneville. Et aussi : 36.15, code espéranto ou alter, sur minitel.



Pierre Desproges Dictionnaire superflu à l'usage de l'élite et des bien nantis

Humour



« Lou dernierus momentou di Zamenhof » (J.-P. Laurensou).



Virqule

Seuil, 27 r. Jacob, Paris 6 / ISBN 2 02 008558 1 / Imp. en France 2 85 9

Zamenhof (Lejzer Ludwik), médecin et linguiste polonais, né à Bialystok (1859-1917). On lui doit l'invention de l'espéranto. Tout le monde s'en fout et c'est dommage. Quand on sait qu'à la base de tous les conflits, de toutes les haines, de toutes les guerres, de tous les racismes, il y a la peur de l'Autre, c'est-à-dire de celui qui ne s'habille pas comme moi, qui ne chante pas comme moi, qui ne danse pas comme moi, qui ne prie pas comme moi, qui ne parle pas comme moi ; quand on sait ces choses, dis-je, on est en droit de se demander si, par-dessus les têtes couronnées

des potentats abscons qui nous poussent au massacre tous les quatre printemps, l'usage d'une langue universelle ne saurait pas nous aider à résoudre nos litiges et à tolérer nos différences avant l'heure imbécile du fusil qu'on décroche et du clairon qui pouète. Enfin. Bon. Utopie.
Lejzer Ludwik Zamenhof est mort à Varsovie le 5 septembre 1917, dans des circonstances dramatiques. Il n'est pas trop fort de dire qu'il est mort pour l'espéranto. Ce jour-là, il descendait la Vistule. Un alligator, d'autant plus désagréable qu'il s'emmerdait tout seul (la proportion d'alligators par habitant en Pologne n'atteint pas zéro pour mille), fit volontairement chavirer son frêle esquif dans les eaux troubles et glauques. L'alligator, qui ne savait pas nager, coula à pic. Quant à Zamenhof, c'est en vain qu'il appela à l'aide les nombreux pêcheurs à la ligne témoins du drame. Aucun de ces braves hommes ne parlait l'espéranto. Aucun ne comprit que le vibrant « Au secours ! » poussé par Zamenhof signifiait « Au secours ! ». Ainsi, alors que d'autres, comme la marquise de Pompadour, réussissent une carrière grâce au maniement d'une langue, Lejzer Ludwik Zamenhof mourut d'avoir voulu montrer la sienne à tous les passants. Aujourd'hui, Zamenhof repose à l'ombre d'un grand cyprès dans le cimetière juif de Varsovie.
Pourquoi au cimetière juif, alors que, de notoriété publique, il était plus catholique qu'un essaim d'intégristes ? Parce que Zamenhof, jusqu'au bout fidèle à son idéal, avait exigé que l'adresse de sa dernière demeure figurât en espéranto sur le couvercle de son cercueil. Pour un croque-mort polonais, hélas, l'espéranto, c'est de l'hébreu.

Alvokoj

Inter pluraj leteroj ricevitaj de SFS, du meritas vian atenton:
-Junulo el Togolando deziras ricevi por sia klubo E°-librojn, kursolibrojn (eĉ malnovajn), vortarojn...
-Juna paro en Rumanio, kiu parolas la francan lingvon kaj esperanton, deziras viziti nian landon kaj petas oficialan invitilon de franca samideano(in)o.
Kiu helpos?

Petu detalojn de J. Hénin.

(fino de la letero de Jorgos)

Denovan gratulon al Emilo MAS kaj ECOLOGIE-&-ESPERANTO r.J.Moulin
33 220 Ste-Foy-la-Grande.
pro la iniciatoj ĝisnunaj kaj al
J-Luc MERMET kaj Ass. des VERTS pour l'Utilisation de
l'ESPERANTO
La Rivière
71 340 Saint-BONNET-de-CRAY.
pro la administraj zorgoj pri la staĝo en CUN-Kojno
LARZAC.

Amike salutas via



L'esperanto, vous connaissez?
Peut-être pas dans les bureaux du "34" car E° devient Esperanto.

● **Espéranto : connaître, comprendre, rencontrer, parler sur un pied d'égalité avec togolais, une hongroise, un coréen, une péruvienne, c'est possible. Contactez Esperanto BP 7073, 34080 Montpellier.**

Chez le "48", c'est encore moins sûr. En plus de l'oubli de certains pays, E° devient Esperantp. Êtu bi patomas Esperantp? kes!

● **PAE-341- Espéranto : connaître, comprendre, raconter, parler sur un pied d'égalité, avec un coréen, une péruvienne, c'est possible. Contactez Esperantp, BP 7073, 34080 Montpellier.**

Cette annonce est parue début Octobre dans chaque département de la fédération...sen tro da ŝanĝoj espereble!
"Le Soir"(journal belge)annonce:

TROISIÈME LANGUE

Pendant que son mari visitait une usine d'ordinateurs à Minneapolis, Raissa Gorbatchev a passé une heure chez une famille d'Américains moyens qu'elle a littéralement ensorcelée... grâce à la manière dont elle parvient à communiquer en dépit de la barrière du langage. « Elle vous prend la main et c'est comme si elle parlait une troisième langue »...(AP.)

KIO ESTAS KAJTO ? Laŭ la difino de la vortaro, ĝi estas ludilo por infanoj, konsistanta el malpeza skeleto kovrita per papero aŭ ŝtofo, kiun oni levi-gas en aero tirante ĝin kontraŭ la vento (sinonimo = drako)... KAJTO estas ankaŭ famkonata muzikanta kvaropo el Nederlando, kiu volonte vizitos vian urbon... kondiĉe ke vi invitos ilin (pri detaloj, legu la invitleteron de Eurokka). Jen la titoloj (kun daŭro) de ilia lasta kasedo (trovebla ĉe nia libro-servo) kaj foto de tiu simpatia juna ensemblo. Cu vi aŭ asocio konata de vi invitos KAJTO-n?

kajto

1. Dancanta ĉevalo 2.03 (J. Baghy/N. Kalma)
2. Mi memoras 5.16 (J. Duijs/N. Kalma)
3. Sen reveno 4.15 (J. Duijs/N. Kalma)
4. Mi ne volas ellitiĝi 3.51 (B. Potts/N. Kalma)
5. La soldato kiu marŝas 3.12 (C. Piron/N. Kalma)
6. Iri vendi azenon 3.02 (G. Berveling/N. Kalma)
7. Avertro 3.22 (P. Thorsen/N. Kalma)
8. Soleco 4.31 (J.S. Dinwoodie/M. Nesse)
9. Forveturo 2.47 (L.C. Deij/N. Kalma)
10. Orangutango 2.29 (R. Rossetti/N. Kalma)
11. Ran-kvarteto 2.22 (J. Baghy/N. Kalma)
12. Tosto 3.01 (S. Urban/M. Nesse)
13. Trista maristo 3.38 (J. Duijs/N. Kalma)
14. Kvalifikoj nenecesaj 1.21 (P. Thorsen/N. Kalma)
15. Vosto 1.57 (M. Boulton/N. Kalma)
16. Knabo kaj kajto 3.07 (J. Duijs/N. Kalma)

Knabo kaj kajto (J. Duijs/N. Kalma)

Rigardante la ĉielon post longa attend', la knabo eksaltas ĉar leviĝis la vent'. La kajto tre belas en ruĝa kolor'. Ĝin faris la knabo, bategas la kor'.

Rekantajo: Knabo kaj kajto kia granda plezur'. Realo kaj revo kia bel-aventur'.

Rapide ĝi flugas, fariĝas malgranda. Laŭte li ĝojas, la ŝnuron tenante. Kia granda sukceso post longa labor'. Li firme ĝin tenas, de l'okuloj jam for.

Jen ĝi aperas en ĉiela lazur'. Jen ĝi forestas post blanka nubmur'. Ili kune nun svingas en bel-harmoni'. Li sentas sin kajto, la kajt' estas li.

©1989 flugdrako



kajto

vinjeto: Laura Tietjens

Donneville la 10an de Septembro 1990

Estimataj,

Ni sendas al vi ĉi-tium leteron por anonci al vi ke la Nederlanda Esperanto-Folk-bando, KAJTO jam fama en esperantio preparas turneon en Francio kaj pli precize en nia regiono.

Kajto proponas koncerti en via urbo dum la periodo de la 1a ĝis la 5a de Aprilo 1991.

La normala honorario de kajto estas 1200FRF kaj ni devas aldoni al tio la vojaĝkostojn de via urbo ĝis la antaŭa sciinte, ke la unua koncerto okazas en Amboise la 31an de Marto.

Kajto povas koncerti por esperanta kaj ne-esperanta publiko kaj krom la esperanto-repertuaro, kajto havas Nederlandan kaj frizon-repertuaron.

Tiu repertuaro estas tradicia kaj nuntempa. Ili kantas "Maristaĵkantojn kaj "Marajn kantojn".

Dum unu semajno kajto koncertis en la norda franca urbo Dunkerque kie ili havis grandan sukceson per tiu repertuaro.

Kajto povas ankaŭ instrui nederlandajn kaj Frizajn popoldancojn al la publiko, inkluzive al la infanoj.

Ankie unu el la kantistinoj de Kajto parolas krom la esperantan, la francan lingvon, tio povas helpi por eventuale koncerti antaŭ ne-esperanta publiko.

Kajto povas koncerti sen sonsistemo, ili bezonas nur grandan salomon por danci la homojn kaj kompreneble sufiĉe da ĉeestantoj.

Ni certigas al vi ke Kajto ĉiam sukcesas varmigi la etoson kaj ke la partoprenantoj ne povas forgesi tiom bonajn momentojn dank'al la ĉarmaj muziko kaj voĉoj.

Krom la honorario kaj la vojaĝkostoj, vi devos gastigi la muzikistojn ĉu ĉe esperantistoj, ĉu en hotelo, certe ili preferas ĉe esperantistoj.

Do, antaŭvidu lokon kaj manĝon por 5 personoj (4 muzikistoj kaj la Soforo).

Ni petas al vi ke vi sciigu al ni kiel eble plej rapide, ĉu tiu propono interesas vin aŭ via esperanto-grupo, ĉiukaze ĉu nee ĉu jese respondu al ni.

Ankaŭ ni volas memori al vi ke ni disvendas Esperanto-Kasedojn de diversaj Esperanto-Rok-bandoj kaj E-Folk-bandoj, ke ni eldonis esperanto-Rok-disketon kun la E-Rok-bandoj Amplifiki kaj la Rozmariaj Beboj, kaj ke ni eldonas Esperanto-Rok-revuon nome "Rok-Gazet". Por mendoj kaj abonoj skribu al nia ĉi-supra adreso.

Antaŭdankon pro via helpo kaj disvastigo de tiuj informoj.

Roke vin salutas la respondeculo de EUROKKA

Floréal Martorell.

Dans la presse

"La Vie" du 16 Août a raconté sur six pages bien illustrées le périple de deux jeunes Vendéens à travers le monde. Bien qu'ayant approfondi avant leur départ leurs connaissances en anglais et espagnol, ils ont eu aussi recours à l'espéranto qui leur a ouvert de nombreuses portes. Il est possible de suivre la progression de ces "globe-trotters" en s'abonnant à leur "lettre-reportage" (voir encadré).



L'espéranto, un sésame pour Maryvonne et Bruno. Ici, en Inde.

NANTIS DE QUELQUES DENIERS, D'UNE INSATIABLE CURIOSITÉ ET DE LA PRATIQUE DE L'ESPÉRANTO, MARYVONNE ET BRUNO ONT UN JOUR PRIS LA CLÉ DES CHAMPS POUR UN PÉRIPLÉ AUTOUR DU MONDE À LA RENCONTRE DES PAYSANS. ILS NOUS ONT LIVRÉ LEURS ÉMOTIONS AVANT DE REPARTIR VERS D'AUTRES HORIZONS.

La Bulgarie... pourquoi la Bulgarie ? Parce que ce pays compte, dans la ville de Pisanica, une école d'espéranto ouverte toute l'année. Pendant quarante jours, Bruno et Maryvonne fignolent leur connaissance de la langue universelle. Après quoi, pendant un mois et demi, les deux Français sont reçus en triomphe — « Ah ! la France, entendront-ils partout, la Révolution, Lamartine, Victor Hugo » — par différentes familles espérantistes. « Chacun voulait nous inviter, se souvient Maryvonne. Un soir, nous avons dû manger trois fois dans trois foyers différents ! »

Après un séjour de trois mois dans les coopératives hongroises — le secrétaire national est un fervent espérantiste —, Bruno et Maryvonne prennent, début 1987, la direction de l'Asie.

UNE GÉOGRAPHIE VÉCUE

Pour partager le vécu et les réflexions de Bruno et Maryvonne Robineau concernant les pays qu'ils traversent, on peut s'abonner à leur « lettre aux amis » paraissant quatre fois par an, ou à leur « lettre-reportage » paraissant cinq fois par an. Cette dernière est plus spéciale-

ment destinée aux élèves des collèges, des écoles primaires et des maisons familiales. On peut, en échange d'un timbre de 7 F, obtenir un exemplaire de l'une de ces publications auprès de : Mme Réthoré, 26 rue de la Chapelle, 49110 Saint-Pierre-Montlimart, qui gère aussi les abonnements.

l'étape suivante.

Un autre défi les attend : le Japon. Dans des conditions assez rares pour des Occidentaux : grâce à leurs contacts espérantistes, Bruno et Maryvonne accèdent à l'intimité familiale, successivement, d'un cadre des usines Toyota, d'un agriculteur cultivant trois hectares de rizière, d'un professeur de lycée et d'une institutrice. ils résident aussi quelque temps dans un centre shintoïste. Fascinés par le contraste omniprésent entre le modernisme et la force de la tradition, ils découvrent avec délice la cuisine japonaise, mais restent un peu perplexes devant les Japonais « généreux, disent-ils, mais difficiles à comprendre ». Après six mois de séjour et quatre mille kilomètres en stop « le Japon est un paradis pour les stoppeurs », la rigueur du visa les pousse vers leur prochaine destination, la Corée du Sud. Là encore, — merci l'espéranto ! — les attend pendant trois mois une tournée de causeries dans les universités et à la télévision, mais le choc culturel est considérable : la notion d'échange est difficile à faire passer, même dans la langue universelle « sous les mêmes mots, Coréens et Français ne mettent pas la même signification ». Rien que dans ce pays, Bruno fabrique 1 500 petits vélos.

Et voici enfin la pièce de résistance : la Chine. Toujours grâce à l'espéranto, les Robineau auront le rare bonheur de la connaître de l'intérieur et dans toute sa profondeur.

Un autre sésame est évoqué dans "Géo" du mois d'Août, le monde de la francophonie, un monde très divers et coloré. A côté de Max Gallo qui plaide pour la défense du français, on retrouve les arguments trop connus du Ministre A. Decaux ou ceux du sociologue A. Touraine pour qui le rayonnement du français passe par la pratique de l'anglais.

La crise du Golfe a amené un lecteur de "L'Evènement du Jeudi" du 6/9 à proposer, "face à l'arabe" une langue commune pour l'Europe... une langue neutre... le latin ! J'ai donc écrit au journal pour signaler une autre solution, "évidemment, l'espéranto".

Si la lettre est bien parue dans l'édition du 18 X, elle est très tronquée. Manque la précision que si le latin n'est pas très accessible, il en est de même pour toute langue nationale et aussi qu'il ne s'agit pas de "faire face", mais de favoriser une meilleure communication, remède efficace contre les préjugés et pour une meilleure entraide internationale. Se comprendre pour s'entendre, s'entendre pour se comprendre !

Quand la presse traite du problème des langues, n'hésitons pas à écrire quelques phrases pour rappeler qu'il existe aussi l'espéranto, en ajoutant si possible quelques faits précis. Si nous voulons que l'on parle d'E°, suggérons le nous-mêmes !

J. Héning.

L'ESPÉRANTO, ÉVIDEMMENT...

Bravo pour votre numéro 305 sur l'Irak et les scénarios possibles. Dans cette épreuve, on ne peut que constater l'absence complète de l'Europe : zéro pointé. Un de vos lecteurs souligne fort à propos que « ce qui sépare le plus les Européens, c'est le problème linguistique ». C'est vrai qu'il « faut doter l'Europe d'une langue commune ». Une langue nationale ne conviendra pas aux autres membres ; de plus, l'anglais ne permet pas de se démarquer des cousins d'Amérique.

La solution préconisée du latin serait intéressante... si la langue était plus accessible. Alors ? Chacun pour soi ou un latin modernisé et simplifié ? Ce dernier porte le nom d'espéranto et n'a cessé d'être un lien entre les deux parties de l'Europe. J. Héning, La Canourgue, Lozère

Voilà la grande différence : l'Europe recouvre une réalité linguistique bien différente, et ce qui sépare le plus les Européens, c'est le problème linguistique. Le remède est donc simple, sinon facile : il faut doter l'Europe d'une langue commune. Laquelle ? Durant tout le Moyen Âge et au-delà, toute l'Europe pensante s'exprimait et communiquait en latin. Cette langue, plus européenne qu'aucune autre, présente un double avantage : n'appartenant à aucun peuple en particulier, elle n'en favorise aucun au détriment des autres ; appartenant au patrimoine culturel de tous, elle est acceptable par tous.

Daniël Dutoya,
La Frette-sur-Seine, Val-d'Oise

Distra paĝo *de René Raynaud*

KRUCVORTOJ



Horizontale:I. Flustras. II. Anatolio estas la t.n. malgranda. Senkolora gazo ankaŭ sengusta kaj senodora. III. Lama italdevena ormone-ro (R=radiko). En Pizo ĝi estas klinita sed tie inversita. IV. Miaj inicialoj. Velŝipo. V. Peni tiri sin sur altan lokon (sed de maldekstre dekstren). Serpento de la vosto al la kapo. VI. Sentinelo. Sufikso aŭ prepozicio inversita. VII. Participa finaĵo. Ĝi kreas ŝteliston. VIII. Se ĝi estas dolora ni manon etendas (R). Mezurunuo por greno. IX. Falis la Berlina (de dekstre maldekstren). Supermezura (R). X. Gajemaj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I					■					
II						■				
III							■			
IV		■								
V							■			
VI						■			■	
VII		■								■
VIII			■							■
IX					■					
X									■	

Vertikale: 1. Amindumaj komplimentoj. 2. Senrajte li proprigis al si bienojn, povojn, ktp.

3. Komencas rikolti. Fonetike: kutima konduto. Granda nekovrita vazo (R).

4. Ano de nomada popolo loĝanta sudoriente de la norda maro. Persona pronomo. 5. Kartludo.

6. Duone altvaloro pro sia malofteco. En raguo. Blanka substanco uzata por glui aŭ rigidigi tolaĵon (R). 7. Se ĝi ekzistas, fiŝetoj ne dormu (R). Kvalifikas obstinegon. 8. Taŭraj batal-

-ludantoj. 9. Kartluda supera emblemo. Ĝi ne defendas kontraŭ doloro (R). 10. Ebenigas aŭ

glatigos lignon per adekvata ilo sed de malsupre supren. Sur la gamo.

ANAGRAMOJ

Trovu anagramon de ĉiu el la ĉi-subaj vortoj:

M A R D O - - - - - K N A B O - - - - - T A B L O - - - - -
 A B L E T O - - - - - A B L E T O - - - - - K A R O T O - - - - -
 P I K E D O - - - - - A R N I K O - - - - - B A R A K O - - - - -
 S T O M A K O - - - - - M A R T E L O - - - - - P O R T I K O - - - - -

La plej longa vorto

Kun la ĉi-subaj literoj trovu du 8-literajn vortojn : O A R T I B K A O

Solvoj de la n° 113 : Krucvortoj: Horizontale: I. Malversacio II. Akvilon'. Ila. III. Ru'. Kos'. Skiz'. IV. Strikta. Aso. V. Invalido. VI. Ju. Gesta. Fr. VII. Leton'. Ami. VIII. Aso. Tiranoj. IX. Nt. Kanoj. At. X. Oazoj. Ezo. // Vertikale: 1. Marsejlano. 2. Akut'. Uesta. 3. Lv. Ri. To. 4. Vikingo. Ko. 5. Elokventaj. 6. Rostas. In. 7. Sn. Altaroj. 8. Iamaj9Cikad'. In. 10. Ilisof. Oaz'. 11. Oazo. Rajto

O aferoj: Okulo, Abono, Odori, Violo, Kaoso, Aboni, Ikono, Odori, Epoko, Donaci, Kanoto, Karoto aŭ Torako, Baroko, Korano, Tenoro.

-Sinjoro Direktoro, mi deziras peti liberan tagon de vi. Mia edzino ŝatus, ke mi helpu ŝin por purigi la domon.

-Mi bedaŭras, ke tio ne eblas. Estas tro da laboro tie-ĉi !

-Dankon, Sinjoro Direktoro. Mi sciis, ke mi povas kalkuli sur vi.

-Mi ronkas tiel forte, ke la bruo vekas min kaj mi ne plu povas endormiĝi...

-Simple dormu en la apuda ĉambro!

La instruisto: -Kiu estas la plej bona momento por pluki pirojn?

Knabo : -Kiam la hundo de la najbaro estas ligita !

La tajpanto de SFS al la legantoj: Kiu estas la plej bona momento por sendi kontribuojn?

Obeema kaj helpema leganto de SFS: Minimume du tagojn antaŭ la limdato!

LIMDATO estas MAKSIMUMO. Pro nerespekto de ĝi, tiu numero malfruas kaj la prokrasto multe ĝenis la tajpanton. Limdato por la venonta n°: 1·XII

Sendu viajn kontribuojn al J. Hénin, Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue

(tel-N° nur se necese: 66 32 86 36). ANTICIPAN DANKON !

